Esperantologio / Esperanto Studies **7** (2015), 126

Geraldo Mattos (1931–2014)

Christer Kiselman

Geraldo Mattos naskiĝis 1931-06-28 kaj mortis 2014-03-23. Li estis membro de la Redakta komitato de *Esperantologio / Esperanto Studies* ekde la komenco en 1999 kaj ĝis la sesa kajero en 2013. En la unua kajero aperis lia artikolo "Esenco kaj estonteco de la *Fundamento de Esperanto*" (1999:21–37). Mi estas danka pro lia multjara kunlaboro en la revuo. Li mankas al mi.

Geraldo estis poeto, tre grava en la esperanta kulturo. Inter liaj multaj verkoj mi volas aparte mencii lian libron *La deveno de Esperanto* (1987).

Li estis elektita al Akademio de Esperanto en 1970 kaj restis membro dum 44 jaroj ĝis sia morto. Dum la periodo 1998 ĝis 2007 li estis prezidanto. Dum la unua parto de tiu periodo mi estis unu el la du vicprezidantoj. En 2000 ni havis belan tempon kune en Tel-Avivo, kaj ni bone kunlaboris i.a. pri la konferenco en Zagrebo 2001-07-28—30, *Internacia Simpozio pri Lingva Planado kaj Leksikologio*.

Inter multaj memoroj mi menciu ke li diris ke li malŝatas la nazalajn sonojn de la portugala, dum por mi *Atenção!* estas tre ĉarma ekkrio.